

lokomotivo  
kun unubrakaj  
pantografoj



**10281** Altecdiferenco inter mallevita kaj tute levita pozicioj de pantografo, rilate al supra eĝo de glitkontaktilo.

ĉeĥa *dosah (pantografový sběrač)*  
dana *maksimal højde*  
franca *développement (pantographe)*  
germana *Reichweite (Stromabnehmer)*  
hungara *csúszósaru út (áramszedő)*  
itala *campo di lavoro (pantografo)*

kroata *doseg (pantografa)*  
norvega *maksimal rekkevidde*  
pola *najwyższe podniesienie  
robocze (odbierak prądu)*  
rumana *cursă a pantografului  
(pantograf)*  
slovena *delovni radij pantografa*

La ĝisnuna Esperanto-termino „efikodistanco (kurentodeprenilo)” taŭgas por 10283 / 12855.

Du ŝanĝproponoj:

**1) pantografa levodistanco 2) pantografa levozono**

PIV klarigas: **zono 3 (MATEMATIKO)** La parto de sfero inter du paralelaj ebenaĵoj.

**10283 / 12855** Distanco inter plej malalta kaj plej alta tuŝpozicioj, en kiu pantografo perfekte funkcias, esprimata kiel altecdiferenco de supra glitkontaktileĝo super pantografbazo aŭ relsupronivelo.

ĉeĥa *pracovní rozsah (pantografový sběrač)*  
dana *arbejdshøjde*  
franca *développement utile de captage  
(pantographe); hauteur de travail*  
germana *Arbeitsbereich (Stromabnehmer)*  
hungara *munkatartomány; munkamagasság*  
itala *campo di lavoro (pantografo);  
escursione di lavoro (del pantografo)*

kroata *radni doseg*  
norvega *arbeidsområde*  
pola *zakres roboczy  
(odbierak prądu)*  
rumana *domeniu de lucru  
(pantograf);  
înălțime de lucru*  
slovena *delovno področje  
tokovnega odjemnika*

Du terminproponoj:

**1) pantografa funkciadzono**

- laŭ ĝisnuna „funkciadzono (kurentodeprenilo)”


**2) pantografa efikodistanco**

- laŭ ĝisnuna „efikodistanco (kurentodeprenilo)” ĉe 10281

**Karaj gekolegoj,**

okaze de festotagoj mi elkore deziras agrablan solenadon laŭ popola kutimo en viaj landoj, kaj dum la nova jaro 2012 stabilan sanon, daŭran pacon kaj multe da ĝojo.

*Heinz Hoffmann*



## Terminara Kuriero

TeKu 143

Decembro 2011

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør

Telefono: +45 49 26 13 19 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: Hoffmann-IFEFF@cablemail.de

**Grava novaĵo: Aperis CD-ROM-disko RailLexic 4.0.**

Internacia Fervojunio UIC realigis novan progrespaŝon de sia terminaro: Aĉetebblas CD-ROM-disko RailLexic 4.0. Ĝi enhavas 5 lingvojn pli ol RailLexic 3.0 (disdonita en Sofio). La entute 24 lingvoj estas angla, araba, ĉeĥa, dana, Esperanto, finna, franca, germana, hispana, hungara, irana *Farsi*, itala, japana, kroata, nederlanda, norvega, pola, portugala, rumana, rusa, serba, slovaka, slovena kaj sveda. Koncerne Esperanton enestas 1102 difinoj pli ol antaŭe, entute 1554. La korektitaj terminoj respondas al niaj decidoj ĝis jarfino 2010. IFEF ricevas 1 senpagan diskon. Faka Komisiono pripensas, kiel ebligi instalon en komputiloj de niaj kunlaborantoj kaj de aliaj interesatoj.

Aliron al la reta terminarversio UIC *TermEdit* portempe havas nur la membroj de UIC-Terminologia grupo – kiel mi. Per tio mi povas ĉiumomente rekte enigi tekstojn en la datumbankon. Nuntempe estas evoluigata reta versio por eksteraj klientoj – sen eblo de enigo. Oni volas fini tiun laboron ĝis jarfino 2012.

**Reagoj al TeKu 142**

6 kolegoj sendis sian kontribuon al taskoj en TeKu 142. Mi sincere dankas pro tio al Heinz Diedrich Hartig, Zlatko Hinšt, Ferenc Kapcsándi, Erik Mortensen, Jan Uldal Niemann kaj E Henning Olsen. Jen la rezultoj:

**08143 H. D. Hartig** kaj la dana grupo jesas pri la unusola propono. Mi konsideras tion decidita.

**05572 Z. Hinšt** indikis alternativon: aŭ **navedulo** aŭ prefere **tagmigranto**

**05573 / 08974** La diferencan solvon 1) preferas H. D. Hartig kaj Z. Hinšt, la sinoniman solvon 2.1) la dana grupo kaj F. Kapcsándi. Laŭ 05572 estas alternativo aŭ „trafiko navedula” aŭ „trafiko de tagmigrado”.

**05837 / 09075 / 09136** La kontribuoj respondas al 05573 / 08974. Alternative al „trajno navedula” ni pridiskutu „trajno tagmigrada”.

**08068 H. D. Hartig** proponas „trajntrafiko ir-reira”; la aliaj preferas solvon 2). Tamen, laŭ denova kontrolo mi konstatas, ke naveda / ir-reira estas ne trajntrafiko,





sed uzado de vagonaroj. Sekve ĝustas:

- 1) trajntrafiko navedvagonara (kiel ĝis nun)  
2) vagonartrafiko naveda      3) vagonartrafiko ir-reira

07134 F. Kapcsándi kaj la dana grupo preferas solvon 1); H. D. Hartig kaj Z. Hinšt preferas solvon 2).

09047 / 09165 H. D. Hartig preferas solvon 1); Z. Hinšt kaj la dana grupo preferas solvon 2).

05442 Z. Hinšt kaj la dana grupo preferas solvon 2).

09153 H. D. Hartig kaj la dana grupo preferas solvon 1); F. Kapcsándi preferas solvon 3).

### Novaj taskoj

Restas en diskutado la antaŭe menciitaj solvoj – ekster 08143.

Interesa traktenda nocio koncemas specon de stacio:

04173 Stacio, el kiu trajnkompleto povas daŭrigi sian veturon nur per direktoŝanĝo.


ĉeĥa	úvratová stanice	itala	stazione di testa
dana	sækstation	kroata	čelni kolodvor
franca	gare en cul-de-sac	norvega	sekkestasjon
germana	Kopfbahnhof	pola	stacja czołowa
hungara	fejállomás	rumana	stație cap de linie
		slovena	čelna postaja

Esenca trajto de tia stacio estas ĝia senelireco en unu direkto. La difino enhavas nenion pri situo de stacidomo kaj aranĝo de pasaĝerkajoj. Por ilustrati eblajn variantojn, jen 2 skizoj:

Skizo A montras simplan, „nespecialan” varianton ĉe unu fervojlinio. Skizo B montras specialan varianton kun kapa situo de stacidomo kaj dekape alireblaj pasaĝerkajoj. Mi proponas ŝanĝi la ĝisnunan Esperanto-terminon „kapstacio” por ambaŭ variantoj al **sakstacio**.


Eksplico: En germana lingvo, *Kopfbahnhof* (= kapstacio) estas sole stacio laŭ skizo B. Eventuale ankaŭ en aliaj lingvoj temas nur pri tiu varianto. Kvankam ĉi tiu speco ne troviĝas en *UIC*-terminaro, oni povas nomi ĝin „sakstacio kun kapstacidomo”. Ĉu vi konsentas aŭ trovas alian solvon?

La solvo „finstacio (linio)” apartenas al 08788 kaj ne taŭgas por 04173, ĉar en disforkeja stacio ankaŭ finiĝas fervojlinio, kaj tamen trajnoj tie povas daŭrigi sian veturon sen direktoŝanĝo sur alia linio.



Alia temo estas diversaj altoj kaj altecdiferencoj de pantografo:

### dubraka pantografo



10280 Alto inter pantografbazo kaj supra eĝo de glitkontaktilo dum mallevita pozicio de pantografo.

ĉeĥa	výška zaklesnutého sběrače
dana	højde af pantograf i nedsænket tilstand
franca	hauteur du pantographe abaissé
germana	Bauhöhe (Stromabnehmer)
hungara	áramszedő leeresztett magassága
itala	altezza di costruzione (pantografo)
kroata	visina u spuštenom položaju (pantograf)
norvega	byggehøyde for nedfelt strømavtaker
pola	wysokość konstrukcyjna najniższa (odbierak prądu)
rumana	înălțime constructivă (pantograf)
slovena	višina spuščenege tokovnega odjemnika

La ĝisnuna Esperanto-termino „konstrualto (kurentodeprenilo)” ne bone respondas al la difino.

Du ŝanĝproponoj:

- 1) pantografalto minimuma      2) pantografalto mallevolima

10286 Alto inter pantografbazo kaj momentrilata pozicio de supra eĝo de glitkontaktilo.

ĉeĥa	styková výška (pantografový sběrač proudu)	itala	altezza di captazione (pantografo)
dana	stighøjde	kroata	visina podizanja (pantograf)
franca	hauteur de captage (pantographe)	norvega	strømavtakerhøyde
germana	Steighöhe (Stromabnehmer)	pola	podniesienie robocze (odbierak prądu)
hungara	emelkedési magasság (áramszedő)	rumana	înălțime de ridicare (pantograf)
		slovena	kontaktna višina

La ĝisnuna Esperanto-termino „konstrualto maksimuma (kurentodeprenilo)” ne ĝustas.

Du ŝanĝproponoj:

- 1) pantografalto aktuala      2) pantografalto momenta